



ESPERO KATOLIKA

ESPERANTISTA SEKCIO

EN LA XXXVIa INTERNACIA EŬKARISTIA KONGRESO

Sendube multaj el niaj samkredanoj kaj smideanoj jam scias, per la informoj de loka kaj nacia gazetaro, ke okazos la XXXVI a Internacia Eŭkaristia Kongreso en Rio-de-Janeiro, la ĉefurbo de Brazilo, de la 17-a ĝis la 24-a de Julio 1955. Ĝi prezentos, kiel aliaj antaŭaj Internaciaj Eŭkaristiaj Kongresoj, ekde sia komenco (1881), grandan kaj kortuŝan spektaklon de fido kaj pieco. La Nacia Organiza Komitato, kiu funkcias sub la vigla gvidado kaj saĝa direkto de Lia Kardinala Moŝto Jaime Camara de Barros, Ĉefepiskopo de la urbo, kaj de Lia Helpepiskopo moŝto Mons. Helder Camara, jam zorgeme kaj ageme klopodas havigi kaj pretigi ĉion kio povos certigi ĝian sukceson kaj brilon.

Por ni Esperantistoj, la venonta Kongreso prezentas apartan kaj specialan intereson, ĉar en ĝia kadro stariĝos Esperantista Sekcio. Niaj brazilaj samideanoj jam faris necesan paŝon ĉe la supre menciita Nacia Organiza Komitato kaj akiris ĝian bonvolan aprobon por starigi „Esperantistan Sekcion,” kiel oni faris dum la Eŭkaristia Kongreso de 1938 en Budapesto.

La Ĝenerala Sekretario de la menciita Komitato, Lia Episkopa Moŝto Mons. Helder Canara, ne nur akceptis kaj aprobis la proponon starigi Esperantistan Sekcion, sed li ankaŭ promesis sian tutan apogon por la organizo de la Sekcio, kaj li eĉ volas uzi Esperanton kiel unu el la ĉefaj lingvoj (Angla, Franca, Itala, Hispana kaj Portugala) en la informiloj de la propagando pri la Kongreso.

Niaj brazilaj samideanoj katolikaj jam komencis prizorgi la Sekcion kaj ili klopodas: organizi esperantistan ĥoron por kanti preĝojn kaj himnojn en Esperanto; havigi salonon por la kunvenoj kaj preĝejon por apartaj funkcioj; aranĝi kulturajn vesperojn kaj festenojn; presigi la propagandilojn kaj la tekston de la Oficiala Himno en Esperanto; fabriki insignon de la Kongreso kun esperanta teksto, k.t.p.

Kompreneble la organizantoj de la Esperantista Sekcio esperas ke Esperantistoj katolikaj de tuta mondo interesiĝu pri la afero kaj venu al la Kongreso, en plej granda nombro kiel eble, por montri al niaj samkredanoj ne-esperantistaj ke Esperanto utilas por la religio, precipe por faciligi la renkontiĝon de niaj diverslandaj fratoj en internaciaj kongresaj kunvenoj.

Oni opinias ke tiu ĉi Esperantista Sekcio antaŭenigos nian movadon, precipe la katolikan, en Brazilo kaj aliaj landoj de Sud-Ameriko. Niaj samideanoj katolikaj nepre devas kapti tiun ĉi bonan okazon por honori Nian Sinjoron en la Eŭkaristio kaj por helpi la aferon de la Sankta Eklezio per uzo de la internacia lingvo Esperanto, kaj por peti Dian benon por nia movado.

(Pluaj informoj sekvos)

★

Kiu aŭ kio estas la kaŭzo de la resaniĝoj de Lourdes?

Ni, kuracistoj, oficiale ne respondas, sed science devas aserti ke ĝi estas kaŭza mistera kaj tute potenca kiu faras tiujn supernaturajn resaniĝojn.

Ni, kuracistoj kredantaj, katolikaj, estas alkondukataj nomi tiun kaŭzon: Dio; aliaj kuracistoj, nekredantaj aŭ skeptikaj, serĉas tiun kaŭzon, ĉiam. . . Oni diris, oni diras ankoraŭ ke tiu kaŭzo estas „natura”, sed oni ne povas pruvi tion! Ni meditas pri tio, kune ni meditu pri tio. . .

Ĉu tiu kaŭzo estas la grot-akvo? — La 25an de Febr. 1858 la fonto de la Groto ekkomencis flui kaj resaniĝoj okazis sekve de ĝia uzo. Depost preskaŭ unu jarcento multe da analizoj estas faritaj de multaj scienculoj. En tiu akvo neniu kuraca principo estas trovita: nek fizikaj kaŭzoj, nek ĥemiaj korpoj kuracaj, nek radiumo aŭ similaj korpoj, nek fongaj antibiotikoj ekzistas. Estas antiscience diri ke la grotakvo estas kapabla, per si mem, resanigi malsanojn, malsamajn malsanojn, malsamajn kriplajojn, malsamajn vundojn, malsamajn lezojn, kaj redoni vivon al mortantoj. Plie, la malsanuloj kiuj resaniĝas sen uzo de tiu akvo? Pri ili oni ne povas diri ke la kaŭzo de ilia resaniĝo estas la Grotakvo!

Ĉu tiu kaŭzo estus la kredo, la resaniganta kredo? — Sed, kiel klarigi ke skeptikuloj resaniĝas? Ke eĉ malkreduloj resaniĝas? Ke agonie mortantoj, mortantoj en komato, resaniĝas? Ke infanetoj, suĉinfanoj resaniĝas? Kaj, kial la resaniĝoj estas tre maloftaj? tre malmultaj? Estas mallogike diri ke la „resaniganta kredo” estas la kaŭzo de la resaniĝoj de Lourdes.

Ĉu tiu kaŭzo estus la Sugestio? aŭ la aŭtosugestio? aŭ la psika frapo? — Sed, tiu hipotezo estas nedefendebla. La sugestio estas psika ago de iu super iu aŭ de io super iu, La aŭtosugestio estas persona psika ago de iu super si mem. La psika frapo estas psika ago, ankaŭ de eksteraj objektoj super la „mio” en stato de malforteco, de senenergiaĵo. Sendube, la eksteraj grandiozaj aperigoj de la religia kulto, la preĝoj, la kantoj, la procesioj, la preĝaj alvokoj, la predikoj. . . povas havi, kaj havas ian influon super estuloj malpligrandigitaj fizike kaj morale. Sendube, la deziro, la dezirego, la sopiro al la resaniĝo, povas inklinigi, volontigi, malsanulojn en ia grado de ekzaltiteco psika. Sendube, la kunvivantaro, la familio de la malsanulo, kuraĝigintaj lin esperi en resaniĝo, povis naski ian gradon de sugestio, sed la resaniĝo ne venas, malgraŭ tio. Oni vidas kelkfoje malsanulojn kiuj kredas esti resaniĝintaj. Ili estas nervozaj temperamentoj aŭ malsanuloj kaptitaj de nervozaj malsanoj, sen anatomiaj konataj lezoj, aŭ ankoraŭ histeriulinoj, psikaj malsanuloj. Tiuj resaniĝoj ne estas sankciataj. Ili estas naturaj kaj ne supernaturaj. Ho jes, tiuj pseŭdo-malsanoj, kiuj estas la sekvo de psikaj kaŭzoj, povas tre bone forpasi sekve de psikaj kaŭzoj, ĉar ili ne estas vere malsanoj organikaj. La hipotezo de la sugestio, de la aŭtosugestio, de la psika frapo ne estas defendebla. Ĉar la sugestio, la aŭtosugestio kaj la psika frapo ne povas resanigi organikajn malsanojn, nek organikajn lezojn. La profesoro Bernheim el Nancy (Francujo), tre renomata pro siaj laboroj pri histerio, mortinta en 1919, kaj kiu estis „kontraŭ Lourdes”, diris: „La sugestio estas rimedo kiu nur celas nervajn aŭ funkciajn perturbojn; ĝi estas sen influo sur la organikaj malsanoj.” Li ankaŭ diris: „La observadoj de Lourdes estas kolektitaj de homoj honorindaj, kleraj; la faktoj ekzistas, nur la interpretado nin dispartiigas.”

Estas ne science pensi ke suĉinfanoj, infanetoj, mortantoj en komato, povus resaniĝi per sugestio, per aŭtosugestio, per psika frapo. Estas antiscience aserti ke organikaj lezoj, anatomiaj lezoj, neresanigeblaj tumoroj, povus resaniĝi per psikaj agoj, kaj tio... subite!

(Daŭrigota)

D-ro Paul Léger.

RELIGIA PERSEKUTADO EN LA UKRAINO.

En 1953 aperis en Romo anglalingva libro titolita „White Book on the religious persecution in Ukraine — First victims of Communism” verkita de ukrainaj pastroj, kontrolita kaj priatestita de kompetentaj ekleziaj aŭtoritatuloj.

La aŭtoroj prezentas la historion de la religia evoluo en Ukraino, la lando situata norde de la Nigra Maro, kiu en 1939 nombris 49 milionojn da kristanaj enloĝantoj: la plimulto apartenanta al la Ortodoksa Eklezio, kaj proks. 10% al la Katolika Eklezio. La moskvaj komunistoj persekutadis kaj ankoraŭ persekutas ambaŭ ekleziojn, kiel malamikojn de l'komunismo, kaj precipe la ukrainan katolikan eklezion en la Okcidenta Ukraino (Galicio).

Oni multon skribis kaj parolis kun emocio kaj admiro pri la martirado de la kristanoj en Polio, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Jugoslavio kaj Ĉinio, sed oni prislentis la grandegan religian martirejon Ukrainon kun milionoj da ortodoksaj kaj katolikaj martiroj.

Por prezenti almenaŭ impreson de la situo de la tiea Katolika Eklezio, ni donas ĉi sube komparajn ciferojn:

	en 1939:	en 1953:
Eparkioj	5	ĉiuj likviditaj.
Teritorioj de Apostolaj Administranto k. Vizitanto	2	likviditaj.
Episkopoj	10	ĉiuj arestitaj, kondamnitaj, mortintaj en malliberejoj aŭ mortigitaj.
Pastroj	2950	50% arestitaj; 20% malaperis aŭ for- kuris eksterlanden; 30% devigitaj al la moskva skismo.
Monaĥejaj pastroj	520	dispelitaj aŭ arestitaj.
Teologiaj studentoj	540	dispelitaj aŭ forkurintaj.
Monaĥinoj	1090	dispelitaj.
Fideluloj	4283000	multe da ili arestitaj aŭ ekzilitaj pro sia religio; la plimulto pasive rezistas.
Paroĥoj	3040	likviditaj aŭ okupitaj per moskvanoj.
Preĝejoj kaj kapeloj	4440	fermitaj aŭ okupitaj per moskvanoj.
Religiaj domoj	195	konfiskitaj, fermitaj aŭ okupitaj per moskvanoj.
Aliaj institutoj		ĉiuj likviditaj.
Katolikaj lernejoj, entute	10336	ĉiuj nun estas marksistaj-ateistaj.
Katolikaj asocioj	41	ĉiuj forigitaj.
Katolikaj presejoj	38	ĉiuj forigitaj.
Katolikaj eldonejoj	35	ĉiuj forigitaj.

Eksilentis la sonoriloj de la ukrainaj katolikaj preĝejoj kaj kapeloj, kaj tamen la Katolika Eklezio ekzistas malantaŭ la fera kurteno en la nuntempaj katakomboj kaj en la koroj de la Ukrainanoj: ĝi ekzistos ĝis la pereado de la ruĝa pesto.

J. J. T.

LEGINDAJ ARTIKOLOJ.

F.R.Banham: Pri la recenzado esperanta, en: Esperanto, 1954, 119 - 121

I.Lapenna: Pri la nombro de „artefaritaj lingvoj”, en: Heroldo de Esperanto, 1-5-1954(1195). W. Solzbacher: Faktoj kaj kritikaj rimarkoj pri la Esperanto-Literaturo, en: Amerika Esperantisto, 1954, 12-14. Cl.Tillenius: Rakontoj en la neĝo. tradukis: Doris Connor, en: Amerika Esperantisto, 1954, 9-11.



Spiona sceno el la tragedio „Gysbreght van Aemstel” dum nia 25a.

★

INTERNACIA SEMAJNO POR LA KATOLIKA JUNULARO.

Dum la kunveno de la junulara sekcio de IKUE oni preparolis la eblon por organizi internacian ferion, ie ĉe la limo de Belgujo, Germanujo kaj Nederlando.

Por ke tia ferio sukcesu, ni devas havi gvidantojn kun iom da sperto kaj tre spertan kampestron.

Sendu proponojn kaj konsilojn provizore al L. Weijts, Fabianusstraat 45, Apeldoorn, Nederlando.

★

KUNVENO DE LA GERMANAJ KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ DUM NIA 25a.

Ĝi okazis sub la gvidado de pastro Ludwig Thalmaier, estro de la katolika E-movado en Germanujo. Dum la lasta jaro havis Katolika E-Centro en Germanujo 500 pagantajn membrojn. La informilo „Semisto” estis eldonata 3-foje. La financa situacio estas bona. „Espero Katolika” havas 116 abonantojn en Germanujo.

★

SEKCIA KUNVENO POR PASTROJ DUM NIA 25a.

Partoprenis 11. Oni decidis fondi en la kadro de IKUE pastran sekcion. Unu el la celoj estas krei pli fortan kontakton inter la pastroj esperantistaj. Pro tio IKUE eldonos specialan liston de la pastroj, de tempo al tempo aperos cirkulero. Oni konsilis, ke la pastroj en sia influfero speciale instigu la gejunulojn lerni Esperanton. Detale oni diskutis pri la temo, kiamaniere oni povus enkonduki E. en la superfakajn internaciajn katolikajn organizojn. Kiel afergvidanto estis elektata pastro Ludwig Thalmaier, **Gräfelfing** bei München, Bahnhofstr. 18 (Germanujo). Al tiu ĉi adreso oni direktu ĉiujn demandojn rilate al la pastra sekcio.

★

I.K.I. IX.

Jen mi denove! Ĉu mi ankoraŭ ne enuigas vin per mia babilado? Diru nur — sed tamen — mi ne ĉesos ĉiam denove meti IKI'n kaj ĝiajn laboron, prosperon

kaj zorgojn antaŭ viajn okulojn. Ne formetu la revuon, ĉar mi parolos ĝuste al vi, jes, al vi, kiu ĉimomente estas leganta la artikoleon pri IKI. Nun fine, mi venas al la kerno de l'afero: via kunhelpo, ne nur por malpezigi la zorgojn de IKI, sed por fari tion **organizite**. Kaj mi ja scias, araba proverbo diras: „Oni povas konduki ĉevalon al la akvo, sed trinki ĝin oni ne povas.” Ĝi mem devas fari tion. Do mi petas: bonvolu trinki!

En Nederlando ĉiu klubo, eĉ la plej malgranda, posedas sian IKI-dometon aŭ kesteton, kaj unu el la plej viglaj anoj zorgas ke ĝi ne restu kaŝita en la ombro. Ho ne! Dum la paŭzo inter lecionoj, prelegoj aŭ kio ajn, tiu ano metas la kesteton antaŭ la nazon de po ĉiu ĉeestanto, neniun esceptante! Kiu posedas mal multe, tiu donas malgrandan moneron, kio posedas iom pli, tiu donas iom pli, sed neniun havas la ŝancon kaŝludi!

Kaj nun mi direktas min precipe al ĉiuj kluboj, unuigoj (aŭ kiel ajn vi nomas viajn Esp. kunvenojn) kiu ĝis nun ankoraŭ ne prizorgis vian Esp. misiigadon kore kaj anime: elektu kiel IKI-prizorganton, prefere vigan ĉarman junulinon, kies ridanta mieno kaj juneca entuziasmo ŝanĝos ĉiun donon en puran ĝojon! Ankaŭ pliaĝuloj forte konvinkitaj pri la graveco de l'afero, povas entuziasmiĝi je la laboro por IKI. Ĉar entuziasmo nepre necesas, sen tiu granda stimulo nenia granda verko estas plenumata. Kaj por havigi al vi tian entuziasmulon, vi, estraranoj, zorgu ke ĉiuj viaj anoj ĝisfunde estu informataj pri la laboro de via propra misiigado. Ke tiu ĉi forta laboro por IKI samtempe estas nepre necesa por la evoluo de nia katolieka Esperanto-movado, mi intencas klarigi sekvantan fojon. Sed nun temas nur pri la edukado de ĉiuj viaj anoj al bone informitaj kompetentuloj. pretaj al sia devo: tutkore sin enmeti por la granda Mondapostoleco en Esperantio. Ek, al la laboro!

E. H.

*

ESPERANTO VIVAS.

Aŭstrio. La aŭstria Jubilea Esperanto-Kongreso je Pentekosto pasinta, sub projekto de la federacia prezidanto d-ro Th. Körner estis plej sukcesa. Rezentantoj de Kardinalo Innitzer, de la federacia kanceliero, de la ministroj por Instruado kaj por Eksteraj Aferoj, de Universitatoj ktp. salutis la kongreson. La urbestro de Vieno, s-ano F. Jonas salutis esperantlingve. La katolikan diservon ĉeestis preskaŭ ĉiuj pli ol 300 kongresanoj kaj al la katolika fakkunsido partoprenis 50 personoj.

Hispanujo. Laŭkutime okazis en diversaj urboj festkunvenoj por celebri la finon de Esperanto-kurso. La redaktorino de E.K. akceptis inviton de la klubo en Tarrasa (Barcelona), kie la prezidanto post festa vespermanĝo disdonis 60 atestojn al gekursanoj. Estis tre gaja societo kaj la multegaj gastoj, farinte honoron al la bone aranĝitaj kaj provizitaj tabloj, dancadis ĝis en la frua mateno. — Ankaŭ en **San Feliú de Codinas** okazis tia festo, kaj la klubo de **Sabadell** aranĝis belan feston je honoro de la pioniro de Esperanto en tiu regiono, patro Marko Lloró. — La klubo de **Barcelona** aranĝis prelegvesperon, dum kiu la redaktorino de E.K. en plenplena salono rakontis pri Nederlando kaj pri la tiea Esperantomovado. — La landa kongreso en **Zaragoza** estis granda sukceso; inter la kelkcent partoprenantoj estis ankaŭ kelkaj eksterlandanoj.

Nederlando. Ek de la 6a de Aŭgusto ĉiuj nederlandaj kinejoj prezentis en la ĵurnalo dum tuta semajno filmeton pri la Universala Esperanto Kongreso en Haarlem. Tiamaniere centmiloj da personoj povis vidi kaj aŭdi la ministro-prezidanton, D-ro W. Drees, kiu en bona Esperanto alparolis la kongreson.

NOMOJ DE SANKTULOJ EN ESPERANTO. VI.

9. Propraj nomoj je -as.

Dum la grupo de propraj nomoj kun la finaĵo -us estas tre granda, alia grupo kun la finaĵo -as enhavas nur malmultajn nomojn. Ili krome posedas alian karakteron pro tio, ke tiuj ĉi nomoj originas el aliaj lingvoj, el kiuj la latina ilin ricevis.

A. Parte ni povas apliki la samajn regulojn:

a. latine:	Cosm-as	france:	Côme	esperante:	Kosm-o
	Luc-as		Luc		Luk-o
	Sabb-as		Sabbas		Sab-o
b.	Andre-as		André		Andre-o
	Matthi-as		Matthias		Mati-o
	Zachari-as		Zacharie		Zakari-o
(Tiel ankaŭ la novtestamentaj:					
	Anani-as		Ananie		Anani-o
	Messi-as		Messie		Mesi-o)

B. Ne ĉiuj tamen spontanee tiel esperantiĝas! Kiel ni tradukos Barnabas, Judas Thaddeus kaj Thomas? La traduko de Barnabas nur malofte troviĝas en la esperanta literaturo kaj la klopodoj estas sufiĉe kapricaj:

Barnabas (La Sankta Biblio, Londono, 1931, Agoj 13,1)

Barnabeo (Migrukunmi p. 197)

Barnabao (Spr. Juv. p. 107)

Barnabo (A. Dombrovski, E.K. 2, 1905,31)

Ĉi tiu formo ankaŭ estas proponita en la listo de propraj nomoj de K. Bein, G. Moch kaj J. Schröder (Ofic. Gaz. II, 1909-10, 218).

Kiel ni eble jam rimarkis la neregulecon de la francaj formoj sub A, tiel rimarkinda estas ĉi tie la diverseco en la latinidaj lingvoj:

france: Barnabé hispane: Bernabé itale Barnaba

Plej bona formo en Esperanto ŝajnas la regula: Barnab-o, laŭ la propono de Prof. Dombrovski.

C. Specialan kazon oferas Judas Thaddaeus kaj same Judas Iscarioth, ĉar ofte senŝanĝe tiu nomo troviĝas, ekz.:

Judas (La Sankta Biblio, Jo. 13,2)

Judas — Judas'on (Papini, Historio de Kristo, p. 372)

Judas (Dante, La Infero, trad. de K. Kalocsay, p. 150, 264)

Judas tamen en la suprenomita listo laŭ propono de G. M. kaj J. S., dum la opinio de K.B. ne estas indikita (1.c., 222).

Estas rimarkinde, ke ni trovas en la franca lingvo la du formojn: Jude Thaddée kaj Judas Iscarioth. Tie do la du eblecoj estas uzataj por distingi la sanktulon kaj la perfidulon. Hispane ni trovas: Judas, kaj itale: Giuda.

La formo Judaso ŝajnas neĝusta, ni tamen ne povas uzi la simplan formon: Judo, ĉar tiu jam posedas alian signifon. (Flanke de tiu termino ekzistas ankoraŭ aliaj: Juda, Judaeus, Judea, kiujn ni nun ne pritraktas).

Tial ni proponas: Ĵudo, kiu nomo ne nur estas simpla kaj regula laŭ skribmaniero, sed krome konservas la elparolon de la latinidaj formoj.

D. Flanke de tiuj du staras Thomas, nomo ofte uzita en la literaturo kaj sub diversaj formoj:

Tomo (A. Dombrovski, E.K. 2, 1905, p. 32)

,, (A. Richardson, E.K. 9, 1912, p. 48)

Thomas (Migrukunmi, p. 119)

Tomao (Migrukunmi, p. 196; Spir. Juv. p. 107)

Tomaso (La Sankta Biblio, Jo. 21,2 k.a.)

„ (Papini, Hist. de Kristo, p. 537)

„ (Thalmaier, Al Altaro de Dio, p. 14)

„ (S. Kamaryt, Filozofia Vortaro, p. 57)

„ (Dante, La Infero, trad. de K. Kalocsay, p. 21)

Dum la unua jardeko de nia katolika Esperanto-movado ni do posedis la klaran kaj regulan Tomo. De kie venis la diverseco en la sekvantaj jaroj?

Eble la latinidaj lingvoj denove donas iun klarigon; ĉar france ni trovas: Thomas, kun la akcento sur la lasta silabo, hispane: Tomás, kaj itale: Tommaso, krome la latina derivivo: Thomassinus.

Kvankam neregula, ni agnoskas, ke la formo Tomaso trovis plurajn uzantojn. La argumento tamen ne estas tre forta, se ni konstatas, ke ekzemple K. Kalocsay en la sama libro uzas: Tomaso kaj Judas!

Inter la tri membroj de la Lingva Komitato ne nur pri Judaso, sed ankaŭ pri Thomas restis malkonsento; G. M. kaj J. S. proponis: Tomazo, kaj K.B.: Tomo (1. c., 228).

Pro tio la simpleco kaj la reguleco de Tomo certe ne estas kondamnindaj! La plua uzo do decidu, ĉu tiu formo venkos.

(Daŭrigota)

H. G. Wannemakers S. J.

*

Ni gratulas :

al p. m. prof. d-ro. Franz Christanell, Salzburg-Parsch, longjara fervora E. pioniro precipe en seminario Borromäum, je lia **50 jara pastra jubileo** kaj al p. m. P. Pius Lenz O. Cap., Klagenfurt, Karintio, Aŭstrio malnova fidela oferema E. apostolo ankaŭ laŭokaza E. predikanto, je lia **40 jara pastra jubileo**.

*

RADIO ROMA DISPONIGAS SIAJN MIKROFONOJN AL LA TUTMONDA ESPERANTISTARO.

Esperantistoj posedantaj magnetofonan aparaton estas invitataj kunlabori en la rubriko PAROLATAJ LETEROJ. Bonvolu sendi plastikan bobenon kun enparolita paroladeto, registrita sur magnetofona paper-strio (Sound Recorder Tape) 1/4'' x 1200 ft. rapideco 7 1/2 inc. = 19 milimetroj/sekundo, al Radio Roma, Casella postale N-ro 320, Roma, Italujo. La bobeno estos resendata je poŝtelspezoj de la stacio. La enhavo estu en perfekta Esperanto kaj la registrado bonkvalita, la temoj plej variaj, sed nur internacie interesaj kaj ne politikaj, la daŭro de la prezentado 18-minuta. La kunlaboro estas senhonoraria. Komisiono senapelacie decidis, ĉu la „parolata letero” indas esti radiodissendata.

*

LINGVA RUBRIKO

Nia membro, s-ro d-ro W. Manders, ano de la Akademio de Esperanto, konsentis respondi al lingvaj demandoj de niaj legantoj, aŭ en E.K., aŭ persone al la sendintoj, laŭ la karaktero de la demando. Sendu viajn lingvajn malfacilaĵojn al s-ro d-ro W. Manders, Boenerstraat 7, Venlo, Nederl. aldonante intern. respond-kuponon.

*

RECENZOJ.

Antologio de Brazilaj Rakontoj, elektitaj de la Brazilia Beletristika Akademio. 2a eldono de Brazilia Esperanto-Ligo. 310 pĝ. Prezo f Havebla ĉe nia L.S. — La verko enhavas 33 rakontojn de 33 verkistoj, esperantigitaj de 33 tradukintoj. Tial la enhavo, la stilo kaj la lingvo estas tre diversspecaj. La tuto prezentas impreson pri la brazila literaturo kaj estas tre interesa por maturaj legantoj, kiuj certe pardonos kelkajn strangajn esprimojn kaj neglataĵojn en la tradukoj. — T.D.

Thomas Hemerken à Kempis: La Imitado de Kristo, en kvar libroj Esperantigita de Frato Wigbertus van Zon L.K. Sub aŭspicio de I.K.I. eldonis: „Antoine”, Geertruidenberg (Ned), 1954, 335 p. Prezo simple bind.: f 3,50 (14 steloj), lukse bind. f 4,50 (18 steloj). Havebla ĉe nia Libroservo.

Jam en 1909 aperis „Imitado de Jesu-Kristo”, traduko de Paul Deschamps, de la presejo S. Martino, Sainte-Radegonde (I. & L.) Francujo. Sed ĝi enhavis nur la unuan libron, estis kvazaŭbroŝura kaj kun lingvo ne tre lerta. Des pli ni ĝojas pro la nuna kompleta eldono de la fama Imitado, taŭge tradukita kaj eldonita. Speciale la luksa eldono bele aspektas. La lingvo estas ekzakta, belstila, ritma. Tre multaj frazoj sonas kiel sencoj saĝaj, kiuj koncize enhavas valoran trezoron pri vivkonduco. Kelkaj rimarkoj povas esti utilaj: p. 17, gentoj kaj specoj estu: genroj kaj specoj; p. 23, skrupulon pro konscienciproĉo estu: riproĉon de konscienco; p. 26, kun kiu ajn virino estu: kun iu ajn virino; p. 38, homo lumita estu: homo lumigita; p. 40, multon, kiun estu: multon, kion; p. 51, kara amikino estu: kara amiko (ĉar temas pri ĉelo). p. 69, ne estos jam timo estu: ne plu estos timo; p. 70, enmemiĝis estu: li enmemiĝis; p. 94, trankvilecon estu: trankvilon; p. 95. Li volas akcepti estu: Li volas toleri; p. 96, Jesuo malestas estu: Jesuo forestas; p. 122, 131, 133, 135, Amatulo estu: Amato; p. 109, 134, amara estu: maldolĉa; p. 112, pezigas vin pli estu: pezigas ĝin pli; p. 138, malhumiliuloj estu: malhumiluloj; p. 142, benita estu benata.

Tiu ĉi postmorta eldono de la lasta verko de Frato Wigberto estu daŭra memorigo pri lia fervora kaj sindona laboro! — H. G. W. *

Laŭda recenzo pri la Imitado ankaŭ aperis en L'Osservatore Romano 5-6 julio 1954. **Sankta Francisko el Assisi kaj la Tria Ordeno sekulara**, el itala lingvo esperantigis A. L. Reni. 16-paĝa broŝuro kun preĝoj, mallonga biografio, priskribo kaj regularo de la Tria Ordeno de S. Francisko. Bona lingvo, klara preso.

La sankta Papo Pio Xa, protektanto de la Esperantistoj. Poŝtkarto kun portreto kaj eklezie aprobita preĝo. — T. D.

Ambaŭ eldonoj de Katolika Esp. Movado en Italujo, Verona, estas haveblaj ĉe nia Libro-Servo: Prezo po f 0,15

*

NOVAJ REPRESENTANTOJ (anstataŭ sur la kovrilo nomitaj)

Hispanujo: f-ino Maria Casasnovas, Calle Arcedianos 1, ZARAGOZA.

Usono: s-ro Henri Soudée, 2535 Belmont Road NW. WASHINGTON DC 8.

Al ĉiuj ensendintoj de artikoloj mi petas iom da pacienco. Kio taŭgas por EK certe iam estos lokigata. Prefere skribu maŝine kun spaco inter la reguloj, por ke mi ne bezonu transskribi por la presisto. Personoj kiuj ne perfekte scias Esperanton, priparolu sian verkaĵon kun spertaj samideanoj kaj ensendu ĝin nur post korekto.

La Redaktorino.

*